

## Ĉeĥoslovakio laboranta: La Muziko.

D-ro Vlád. Helfert, prof. de la Masaryk-Universitato.

Kiam post la ŝtata renverso en la jaro 1918 estis proklamita la sendependa ŝtato ĉeĥoslovaka, ekestis ankaŭ por la evoluo de l' muzika arto cirkonstancoj multe pli favoraj ol ili estis dum la imperiestra reĝimo de l'Habsburgoj. La liberiĝo de ĉiuj popolaj fortoj manifestiĝis ankaŭ per evoluo de nia muzika kulturo. La bazo de tiu ĉi kulturo certe estas edukaj kaj reproduktaj institucioj, kiuj kunlaboras ĉe l'kresko intensa kaj ekstensa de l'muzika vivo. La edukon de l'muzika adeptaro prizorgis antaŭ ĉio la konservatorio en Praha. Tiu ĉi konservatorio akiris famon tra la tuta mondo jam dum la malnova reĝimo, nome per la mondfama violon-skolo, reprezentita per Šefčík, František Ondříček, Kubelík, Kocián, Příhoda k.a. Ĝia direktoro kaj samtempe profesoro de komponanto estis majstro Antonín Dvořák. Tiun ĉi konservatorion oni plilarĝigis post la renverso aldonante al ĝi majstran fakon, en kiu kolektiĝis la plej elstaraj individuoj muzikistaj. Ĉe ĝi instruis kiel profesoro de kompon-arto J. B. Foerster kaj Josef Suk, ĉe ĝi instruas la komponistoj Vítězslav Novák, la konata fortepian-pedagogo Vilém Kurz, Karel Hoffmeister kaj la anoj de l'fama ĉeĥa kvarteto Karel Hoffmann kaj violonĉelisto Zelenka. Al ĝi apartenis ankaŭ la mortinta aldisto Jiří Herold.

La plej multaj fondaĵoj okazis ekster Praha. En Brno estis fondita post la renverso konservatorio, kies direktoro fariĝis la komponisto Kunc. La majstro-fakon de l'kompon-arto gvidis la fama Leoš Janáček. En Bratislava fondiĝis Muzika Akademio. Sed ankaŭ malpli grandaj urboj neordinare energie fondis novajn muzikajn lernejojn aŭ plilarĝigis la malnovajn. Koncerne muzikon reproduktan, la bazo de l'muzika vivo en Praha estas la Nacia Teatro kaj la Ĉeĥa Filharmonio. La Nacia Teatro fariĝis post la renverso sceno ŝtata. Ĝian operan fakon gvidis ĝis la pasinta jaro la komponisto Otakar Ostrčil, kiu famiĝis per aranĝo de sistemaj kaj stile brile ekipitaj operaj cikloj de ĉeĥaj komponistoj. Dum lia estrado iĝis el tiu ĉi Ŝtata Opero vera opero nacia, t.e. servanta al la ĉeĥa muzika kulturo.

Ankaŭ Brno havis sian propran ĉeĥan teatron jam antaŭ la renverso. Sed ĝi devis kontentiĝi per malvasta konstruaĵo pro la malfavoro de l' tiam urbeŝtato, kiu estis germana, spite la ĉeĥan plimulton de l' loĝantaro. Post la renverso mezuriĝis la fortoj laŭ sia efektiva proporcio kaj la rezulto estis, ke la urba mastrumado aŭtomate transiris en manojn ĉeĥajn. Tio havis bonajn sekvojn por la ĉeĥa teatro. Ĝi ricevis grandan konstruaĵon de l'urba teatro. Reorganizante la nacian teatron en Brno, oni fondis novan operan sektion, kies estro fariĝis František Neumann. Dum lia gvidado la opero atentigis pri si per gloraj unua-fojaj prezentadoj de operoj de Janáček, Ostrčil k.a. ĉeĥaj komponistoj. Nun gvidas la operon en Brno Milan Sachs, veninta el Zagreb.

En Bratislava estis fondita la Slovaka Nacia Teatro, kies estro estis la mondfama direktanto kaj komponisto de l' Pola Sango Oskar Nedbal. ~~Lin sekvis Karel Nedbal.~~ Konstantan operan teatron havas ankaŭ la urboj Plzeň, Olomouc kaj Mor. Ostrava.

Por la koncerna vivo ĉefkondiĉo estas donita ~~antaŭ ĉio~~ per simfonia orkestro. Praha havas sian Ĉeĥan Filharmonion, kiun fondis en la jaro 1902 la tiam fama direktanto Ludvík Vítězslav Čelanský. Nun direktas tiun ĉi orkestron Václav Talich. En Brno zorgas pri la koncerta orkestra vivo la teatro-orkestro. Simile en Bratislava kaj Mor. Ostrava. Por la orkestra vivo en Ĉeĥoslovakio estas krom tio karakteriza alta nivelo de amatoraj orkestroj, kiuj multloke kontentigas la bezonojn al oftaj simfoniaj koncertoj: Praha kaj Brno havas orkestrajn asociojn, simile ankaŭ Bratislava. La urbo Kladno havas propran Filharmonion, simile la urboj Příbram, Plzeň, Znojmo, České Budějovice kaj Prostějov; ili aŭ havis aŭ ankoraŭ tenas siajn amatorajn simfoniajn orkestrojn sur konsiderinde alta nivelo.

Novan, ĝis tiam neantaŭvideblan instigon ricevis la muzika vivo per la radio. La radiostacioj en Praha, Brno, Bratislava k.a. havas siajn proprajn orkestrojn, kiuj ofte tre efike influas la evoluon de l' muzika koncerta vivo. Apartaĵo de ĉsl. Muzika vivo estas alta nivelo de ĥor-kanto. Ĝi estas fenomeno, kiun konstatis la kultura publiko de Eŭropo jam antaŭ la renverso. Post la jaro 1860 fondiĝis ĉe ni tre fervore kant-unuiĝoj, antaŭ ĉio la unuiĝoj Hlahol en Praha kaj la Filharmonia Rondo en Brno. Krom ili ĉiu ĉeĥa urbo kaj urbeto havis sian propran kant-unuiĝon. Evoluis tre atentinda kulturo ĥor-kanta, kiu daŭras ankoraŭ nun, kvankam ne plu en tia intenso. Tamen ankoraŭ nun apartenas ekzemple la ĥoro de l'Filharmonia Rondo en Brno al la plej bonaj miksitaj ĥoroj. Ĝia

Ĥorestro estas la komponisto Jaroslav Kvapil en Brno. Sur tiu ĉi larĝa bazo de kant-ĥoroj fondiĝis la famaj ĥoroj instruistaj, kiuj gloriĝis tra la tuta mondo. Antaŭ ĉiuj menciinda estas la Kant-ĥoro de Moraviaj Instruistoj, fondita de Ferdinand Vach. Tiu ĉi brila ĥoro metis la teknikon kaj esprimkapablon de l'ĥor-kanto sur tute nova fundamenton. La Kant-ĥoro de Moraviaj Instruistoj donis al la ne-ĥora kantado novajn direktojn kaj iniciatis en Ĉeĥoslovakio egan movadon. Laŭ ĝi ekzemple fondiĝis la ĥoro de l' Praha-aj instruistoj, la ĥoro de sud-kaj orientbohemiaj instruistoj kaj la ĥoro de l' slovakaj instruistoj. La brilan ekzemplon de Vach sekvis ankaŭ virinaj ĥoroj. Li mem fondis la Ĥoron de Moraviaj Instruistinoj. Simila instruistina ĥoro fondiĝis en Praha. Tiu ĉi altnivela kulturo de ĥorkanto apartenas al la plej elstaraj trajtoj de l'ĉeĥa muzika reproduktado. Apud ĝi saman principan signifon havas la brila stato de ĉambra muziko, ĉefe de arĉ-instrumenta kvarteto. Kion signifis la Ĉeĥa Kvarteto ne nur por la kvartet-luda arto en Ĉeĥoslovakio, sed eĉ en la tuta Eŭropo, estas al ni ĉiuj certe bone konata. La sorĉa kuniĝo de ĉeĥa muzika senpereco, de ĉeĥa entuziasmiga temperamento kaj de ĉeĥa muzika profundeco kun teknika precizeco kaj perfekteco, tio estis la sekreto, per kiu la Ĉeĥa Kvarteto venkis ĉiun aŭskultanton. Post la morto de ĝiaj elstaraj anoj, nome Josef Suk kaj Jiří Herold en la j. 1935 finiĝis post pli ol benitaj 40 jaroj la benita agado de tiu ĉi kvarteto. La kvarteto de Šefčík disiĝis ankoraŭ antaŭ la Ĉeĥa Kvarteto, nome post la morto de sia violonisto. ~~Sed jam estas anstataŭantoj.~~ La nuntempa kvartetan ludon reprezentas la kvartetoj de Praha kaj Ondříček kaj la Moravia Kvarteto. Ili ĉiuj distingiĝas per perfekta disciplina kunludo. Ke krom tio ekzistas en ĉeĥaj urboj granda nombro da amatoraj kvartetoj, certe ne necesas speciale mencii. Tio pravas la fakton, kiel profunden kaj larĝen trapenetris la brila ekzemplo de l' Ĉeĥa Kvarteto levante la muzikan meznivelon de la ĉeĥa publiko.

Sur tiu ĉi bazo evoluas la muzika kreado de l' nuntempo. La ĉsl-an kreadon de l' estanteco reprezentas ĝenerale komponistoj antaŭmilitaj. Antaŭ ĉiuj menciinda estas majstro Josef Bohuslav Foerster, kiu estas jam 76-jara. Lasttempe li komponis kaj verkis sian novan operon *Bloud* - kies prezentado okazos nunjare en Praha en la Nacia Teatro. Ankaŭ Vítězslav Novák, nun 65-jara, kreis siajn plej valorajn verkojn jam antaŭ la milito plilarĝigante per ili la horizontojn de l' ĉeĥa muziko. Post la renverso li kreis la operon *Dědův odkaz* - La heredaĵo de l' avo, kaj la Aŭtunan simfonion kun ĥoro. En tiu ĉi verko li esprimis sian amon al la popola kanto kaj al la naturo kaj ĝiaj furiozantaj elementoj. Tiu ĉi majstro kaj plej energia disvastiganto de progreso kaj de l'ĉeĥa muziko certe ankoraŭ pliriĉigos la ĉeĥan muzikon per valoraj verkoj. Novák, Suk kaj Ostrčil estas brila trio, kiu signifas novan epokon en la ĉeĥa muziko post la generacio de Smetana, Dvořák kaj Janáček. El tiu ĉi trio vivas nur Novák. Suk, mortinta dum sia plej matura kreado, transdonis tuj post la renverso al la publiko sian grandiozan orkestran verkon *Zrání-Maturiĝo*, kiun sekvis lia Epilogo por orkestro, ĥoro kaj solkantoj. La Epilogo montras lian majstrecon en kompon-tekniko kaj por-instrumenta aranĝo. Ĝi estas verko, pri kiu ĉiam fieros ĉsl-a kulturo. La sorto decidis, ke la Epilogo fariĝis efektive la lasta verko de Suk. - La trian kaj plej junan el tiu ĉi trio, Otakar Ostrčil, estinta ĉefo de l' opero de l' Nacia Teatro, ni trovas en la militjaroj kiel komponiston pleje maturiĝintan. En la tempo post la renverso li kreis du novajn operojn, la tragikan *Legendon el Erin* (Irlando) uzante la tekston de l' ĉeĥa verkisto Julius Zeyer kaj klaran bonhumoran operon *Honzovo království* (La reĝlando de naivulo) laŭ temo de Tolstoj .

Sur la verkaro de J. B. Foerster kaj tiu ĉi tri majstroj kreskas la moderna muziko de l' juna ĉsl-a generacio. La evoluon de l'nuntempa ĉsl-a muziko plej influis la skolo de Vítězslav Novák. El liaj disĉiploj estas nominda precipe Ladislav Vycpálek, nun 53-jara. Li distingiĝas per severeco kaj vereco en siaj inspiroj. Lia verko surhavas trajton de certa severa asketismo. Li skribis preskaŭ nur porvoĉajn komponaĵojn, precipe kantojn kaj kantatojn. El ili la kantatoj pri *La lastaj aferoj de l' homo* kaj *Benita la homo*, apartenas al la plej grandaj verkoj de moderna ĉsl-a kreado. Ili distingiĝas per majesta, religia patoso. Plua disĉiplo de Novák, nome la 53-jara Jaroslav Křička, havas tute alian temperamenton. Li estas naturo sciigema, plena de feliĉa humoro, kiu trapenetras liajn spritajn kantojn, precipe liajn Fablojn kaj lian komikan operon *La Fantomo en kastelo* k.a. Grandajn operojn verkis Jaroslav Novotný, disĉiplo de Novák. Li falis en milito kaj tiel li ne povis evoluigi sian riĉan lirikan kaj kantan talenton. Boleslav Vomáčka, 49-jara, estas en la skolo de Novák apero pli tradicia, inklina al Smetana. Interesa estas la frata duo Jaroslav kaj Otakar Jeremiáš. La tro frue mortinta

Jaroslav esperigis multe por la ĉeĥa muziko, se ni juĝas laŭ lia oratorio Jan Hus kaj laŭ lia opero La maljuna reĝo. Otakar, la pli juna, atentigis pri si per simfoniaj verkoj kaj per la forte drama opero La Fratoj Karamazof. Li estas estro de l'radia orkestro en Praha. Per tiuj ĉi nomoj tamen la disĉiplaro de Novák ne estas elĉerpita! Specialan lokon okupas Otakar Šín, 54-jara, profesoro de l' konservatorio en Praha. Li estas eminenta teoriisto, sed ankaŭ kiel simfonia komponisto li ne estas sensignifa. Jindřich Vojáček, 48-jara, distingiĝas per glata komponista tekniko en siaj simfonioj kaj operoj. Milan Balcar, 49-jara, kliniĝas en siaj kantoj al la pli malnova modelo Zdeněk Fibich. Disĉiplo de Novák kaj Foerster estis Karel Boleslav Jirák, 44-jara, kiu kreskis sub influo de Mahler, kiel montras liaj kantoj kaj unuaj simfonioj. En siaj aliaj verkoj, precipe en la II-a simfonio, kaj kantoj li montriĝis kiel muzika modernisto. Vladimír Polívka, 40-jara, evoluis el disĉiplo de Novák ĝis rimarkinda modernisto.

Dum la disĉiploj de Novák distingiĝas per emo al progreso, montras la disĉiploj de Foerster trajtojn de tradiciemo. Tion montras Bohuslav Taraba, 42-jara, en siaj mistike kolorigitaj simfonioj, kaj Miroslav Krejčí, 45-jara, en siaj delikataj kantoj kaj ĉambraj komponaĵoj. Jindřich Hýbler kunigis instigojn de Foerster kun la influo de l'germano Schönberger. Kontraŭe en la komponistino Julie Reisserová kuniĝas la influo de Foerster kun la instigoj, kiujn ŝi ricevis en Parizo ĉe Roussell.

El la skolo de Suk eliris Frant. Pícha, 43-jara, ĉe kiu ligiĝas sento kaj profundeco kun teknika majstreco. Li verkis ĉambrajn komponaĵojn kaj kantatojn. Granda espero de l' moderna ĉsl-a muziko estas Pavel Bořkovec, 42-jara. Li apartenas al la plej moderne orientitaj komponistoj. Similan vojon iras Emil Hlobil, 35-jara. Jaroslav Řídký, 39-jara, estas en siaj simfonioj pli proksima al Dvořák.

Specialan mencion meritas du progresemaj komponistoj, kiuj energie igis progressa la ĉsl-an muzikan arton, nome Bohuslav Martinů, 45-jara, kaj Alois Hába, 43-jara. Martinů vivas en Parizo, kie li konatiĝis kun novaj direktoj muzikaj, precipe de Stravinský. Li sukcesis kunigi liajn impulsojn kun ĉeĥa muzika varmece kreante tiel verkojn de granda kaj profunda beleco kiel montras lia lasta opero Ludoj pri Mario. Alois Hába estas ankaŭ konata kiel kuraĝa kreanto de kvaron-tona muzika sistemo kaj de muzikaj novaĵoj. Liaj disĉiploj faras novan skolon, al kiu apartenas lia frato Karel Hába, 38-jara, Miroslav Ponc, Rudolf Kubín k. a.

Apartan grupon en la nuntempa ĉeĥa muziko reprezentas komponistoj de Moravio, kie Leoš Janáček fondis propran komponistan skolon. Survoje al tiu ĉi skolo staras Emil Axman, 49-jara, kiu distingiĝis per kantatoj, en kiuj li kunigis neordinaran pasiecon kaj varmecon de l' esprimo kun kapableco komponi larĝlinie. Al la disĉiplaro de Janáček apartenas Josef Čermák, 56-jara, Vladimír Ambros, 45-jara, F. M. Hradil, 38-jara kaj Pavel Haas, 37-jara. En Jan Kunc, 53-jara, nune direktoro de konservatorio en Brno, kuniĝas la influoj de Janáček kaj Novák. Václav Kaprál, 47-jara, estas lirikisto de riĉa trezoro sentimenta manifestiĝanta precipe per kantoj kaj komponaĵoj por fortepiano. Vilém Petrželka, 47-jara, estas pli proksima al Novák, kiel montras liaj verkoj, speciale la granda kantato La Maristo Nikolao. Alian vojon iras du pliaj disĉiploj de Janáček, nome Jaroslav Kvapil, 44-jara, kaj Osvald Chlubna, 43-jara. Kvapil studis ankaŭ ĉe Max Reger en Leipzig, kie li akiris sekuran teknikon komponistan. Rimarkinda estas lia granda kantato La Leona Koro. Chlubna, kiu verkis 4 operojn, estas majstro en por instrumenta aranĝo.

Apud tiuj ĉi komponistoj kreskas nova komponista generacio, kiu montras, ke la konata ĉsl.-a muzikemo manifestiĝas ankaŭ estonte per multnombraj komponistoj. Same aspektas la muzika vivo en Slovakio, kie Alexandr Moyzes, 30-jara, vekas grandajn esperojn.

Tiu ĉi konciza resumo, donanta al vi elektitajn nomojn de nur pli gravaj komponistoj, certe vin konvinkis, ke Ĉeĥoslovakio okupas en muzika kulturo lokon unuavican, kvankam ĝi apartenas al ŝtatoj negrandaj.

La denatura ĉeĥa muzikemo estis rekonata jam en la 18-jarcento kaj tiam metata apud la konatan muzikemon italan. Ĝi manifestiĝas ankaŭ nuntempe per intensa vivo sur kampoj krea kaj reprodukta.

Mi dankas pro via afabla atento.

Tradukis: Th. Kilian,  
29-1-1936.